# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.

No 15. J u n i o 1953 Aperas laŭbezone


## TUTŜTATA ESPERANTISTA KONFERENCO EN PŘEROV

22.-23.5.1954 estis bona sukceso. Kunvenis samideanoj el ĉiuj partoj de la ŝtato - la aranĝintoj bedaŭrinde ne informis nin, kiom kaj el kiuj lokoj, sed certe alvenis minimume 100 p. Pli ol 400 km vojaĝis la 82jara Dro Kremmer el Košice, sed eĉ malproksima Praha kun siaj 13 p. estis digne reprezentita.

Enkonduke parolis slov. pastro Alojz Macek el Mikulov. Sian principan vidpunkton koncerne IL klarigis Hromada el Praha, Ginz el Praha parolis pri nuna uzo de Esperanto kaj pri niaj lastatempaj sukcesoj, Lička el Zábřeh pri kunlaboro kun pacorganizoj kaj pri veno de aŭstralia samideano al ĈSR, Jurka el Přerov rekomendis, ke la lernantoj de la someraj kursoj estu informitaj pri sukcesoj ĉi tie raportitaj, Jeřábek el Prostějov rakontis pri vojaĝo de s-ino Havránková tra Nederlando, Sattek el Příbor invitis al someraj kursoj en Příbor, Kuzník el Opava al tiuj apud Hradec u Opavy, Blachut el Třinec al kunveno en Třinec kaj sur la monto Čantoria, Matoušová el Gottwaldov al regiona konferenco en Gottwaldov, Slaný el Ostrava donis multajn organizajn informojn kaj invitis al venonta reg. kunveno en Místek. Ĉiu partoprenanto ĝuis la konferencon laŭ sia maniero. Sabate vespere ĝis mateno oni rigardis kun plezuro prezentadon de niaj artistoj (aktoroj, muzikistoj, kantistoj ktp.) kaj la junularo diligente dancis dum la paŭzo. Dimanĉe post la laborkunveno ni povis admiri la urbon, sed eĉ pli la 12 lerte aranĝitajn propagandajn fenestrojn en la ĉefstratoj kaj poste la valorajn kolektojn de la urba muzeo. Agrabla estis la renkonto kun la flue E-parolanta sesjara filino de s-no Blachut.

Kun bedaŭro disiris la partoprenintoj al siaj hejmoj. Gz.

## HO, TAGOJ DOLĈAMARAJ

Ho, tagoj dolĉamaraj,
dum devas ni esperi !
Ĉar vin ne vidi, kara,
signifas plu suferi.
Ho, tagoj dolĉamaraj,
dum devas ni esperi !

Ĉu por la kor' amanta
sufer' ekzistas plia ?
Se jes, nur unu granda:
Vin vidi, kara mia ...
Ĉu por la kor' amanta
sufer' ekzistas plia ?

Eli Urbanová

## GRANDA ESPERANTO-EKSPOZICIO EN MONTEVIDEO

Ĝenerala konferenco de UNESCO proksimiĝas. Tiu konferenco traktos i.a. ankaŭ pri Esperanto. Esperanto-ekspozicio, kiu samtempe okazos, devas esti la plej granda kaj konvinkiga. Ankaŭ ĉsl. esp. movado devas esti digne reprezentita. Ni urĝe bezonas ankoraŭ multe da materialo - libroj, broŝuroj, gazetoj, gvidlibroj ktp. Vian kontribuon al la ekspozicio sendu tuj: aŭ direkte al s-o Rodolfo Garcia, Calle Yaguaron 1397 MONTEVIDEO, Urugvajo, aŭ al Jaroslav Šustr, Dlouhá 10 Praha I. La laste nomata forsendos amase la materialon en dua duono de junio. AGU TUJ! Informu nin pri ĉio, kion vi forsendas direkte!

## AL NIAJ INFANOJ - VERKISTOJ !

Gepatroj kaj instruistoj atentu nian ripetatan alvokon en tiu ĉi afero. Sendu plej rapide materialon al T.Kurisu ĉe Heibon-Ŝa, Infana fako, N-o 4, Yomban-tyo, Kozimati, Tiyoda-ku, TOKIO, Japanujo.

Esperantista Klubo en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo. La kunveno de la junularo komencas unu horon pli frue, do je la 19a samloke. Per tiu aranĝo estas ebligite al la junularo ĉeesti ambaŭ kunvenojn, kaj pli aĝaj membroj de la klubo samvespere povas ĉeesti ankaŭ la kunvenon de kluba junularo. La programoj de la kunvenoj estas ĉiam zorge preparitaj kaj ilia temo estas anoncata en nia Bulteno. Junularaj kunvenoj havis en la lasta tempo jenajn temojn: 7.4. prelegis Jiří Pastor pri televizo, 14.4. Anna Veselá: Paskaj kutimoj ĉe diversaj nacioj, 21.4. konversacia kaj ekzamena vespero, 28.4. La junulara tendaro en Žimrovice - parolis Kratochvílová, filmon projekciis Dro Sádlo.

VENONTAJ PROGRAMOJ:

9.6.: Josef Vítek: Tutmondaj esp. novaĵoj.
16.6.: Vespero de la Junularo
23.6.: Jaroslav Mařík: Kun Fialka trans naŭ montarojn. IIa parto.
30.6.: E. Suchardová - A. Seemann: Kiel ni studas novan rolon.
7.7.: Jan Zemek: Bramanaj profundaj veroj. Eltiroj el orig. bramana letero.
14.7.: Dolfa Bartošík: Kulturaj rilatoj inter ĈSR ka Nederlando. IIa parto.
21.7.: Ota Ginz: Nekredebla kaj tamen vera.

## IIIa SOMERA ESP. KURSARO EN LA VALO DE RIVERO MORAVICE (SILEZIO).

Ĉi tiu somera lernejo estas sub tendoj en la belega ĉirkaŭaĵo de fama kastelo Hradec. Partopreni povas ĉiu juna homo, kaj eĉ tiu, kiu nur anime sentas sin juna. Por 14 taga tendara vivo oni devas pagi 200 - 220 Kčs.
La kursaro komencos la 5an de julio kaj estas jene dividita:
5.7.-18.7. - kurso por komencantoj, 19.7.-1.8. - por progresintoj,
2.8.-15.8. - por gvidantoj de niaj junularaj grupoj. Oni instruos ankaŭ kiel efike propagandi kaj organizi laboron de rondetoj. Ĉiu interesulo devas laŭeble plej baldaŭ sendi aliĝilon, por povi al li certigi 50%an fervojrabaton. Lasta fervojstacio estas Hradec u Opavy. Ni mencias ankaŭ, ke la 1.8. (inter dua kaj tria kursaro) okazos en kastelo Hradec tutŝtata konferenco de Junularo. Aliĝojn sendu kaj informojn petu de: Jar. Kuzník, Rooseveltova 17, Opava.

- -

LA RICEVANTOJ DE "HEROLDO DE ESPERANTO" estas urĝe petataj, ke ili sian ekzempleron disponigu al laŭeble plej granda nombro de samideanoj en sia ĉirkaŭaĵo. Ni esperas, kie tiun ĉi peton plenumos ankaŭ samideanoj, por kiuj estis pagita ilia abono en eksterlando. Laŭ tiu ĉi maniero ni volas ebligi intensan uzon de ĉiu ekzemplero, kiam ni ne povas kontentigi deziron de la multnombraj interesuloj. En Praha turnu vin al prez. de EK, en Běhánky-Teplice: Inĝ. B.Guttman, Běhánky 142 - en Čakovice kaj E.Junularo de Praha: Vlast.Vyhlídka, Masarykova 33 - Česká Skalice: J.Košťál - Č.Budějovice: Karel Hofhansel, Máchova 280 kaj Inĝ L.Krajíc, Žižkova 42 - Děčín: J.Babička, Baarova 20 kaj V.Růžička, Krásnostudenecká 69 - Doksy: Bohuslav Tyle, SBČS - Dolní Čermná: Karel Štěpánek - Havlíčkův Brod: Inĝ. J.Řebíček, Humpolecká 208 - Hradec Králové: Jar.Dolanský, Masarykovo nám 538 (Daŭrigo).

- -

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA LIVERAS:
Julie Šupichová : Hovoříme esperantsky - Kčs 4,80 afrankite
KANTARETO de fratoj Filip, enhavanta 61 kantojn kun aldonitaj muziknotoj. Bona pliriĉigo de via biblioteko kaj konvena donaco por via eksterlanda amiko. Kčs 10,40.

- -

KIAM MULTO FIASKAS, ESPERANTO HELPAS.
Ĝusteco de tiu ĉi aserto nun denove pruviĝis, kiam iu esperantisto en Praha eksciis, ke lia amiko serĉas jam dum preskaŭ dudek jaroj sian fraton, elmigrintan tiam en Germanujon. Leteroj, adresitaj al lia lasta loĝloko Karlsruhe revenis. UEA-Delegito en Karlsruhe s-o Helfers ne kontentiĝis per nura konstato ke la serĉata persono ne plu loĝas en lia urbo. Li eksciis, ke tiu sinjoro edziĝis en Karlsruhe kaj li trovis la gebopatrojn. Kaj tie li aŭdis, ke la serĉato foriris kun sia edzino al Aŭstralio. S-o Helfers eĉ aranĝis, ke la sinjoro en Aŭstralio eksciu la nunan adreson de sia frato en Praha, por ke li povu al li senpere skribi. - Jen esploro, kiu ne estus efektivebla per aliaj rimedoj.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.
Proksima numero por julio-aŭgusto aperos la 15.7.   Eldonkvanto 900 ekzempleroj.

# VERDA VOĈO

INFORMA, INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE LA SOMERA KOLEGIO
DE E S P E R A N T O.
SPIRITA VIGLECO KONSERVAS JUNECON.

La deziro de ĉiu homo estas resti daŭre juna. Al tiu ĉi celo helpas multe la sporto. Sed sportado estas nur unuflanka kaj multaj homoj eĉ tro taksas ĝian efikon. Oni forgesas la fakton, ke estas spirito, la spirita vigleco, kiu igas homojn junaj. Kaj mi asertas, ke precipe tiu ĉi spirita vigleco estas ofte pli grava ol multaj ne nocie uzataj sportoj. La bona ekzemplo estu al ni vivo de multaj eminentaj homoj. La penso (ideo) estas kreanta forto, tion ni ne forgesu. Ĉio farita ĉirkaŭ ni, naskiĝis antaŭe en spirito kaj fizikaj fortoj nur plenumis tion, kion forta spirito ordonis. Per sporto ni kulturu ne nur la korpon, sed ankaŭ la spiriton. Nia refreŝiĝo estu ambaŭflanka.

Somera Kolegio de Esperanto en Doksy havas ĉiujn eblecojn por plena refreŝiĝo al ĉiuj partoprenantoj. Vi ne nur povas tie sportadi (bani sin, tenis-ludi, turist-ekskursi ktp.) por refreŝigi vian korpon, sed per studo de diversaj esp. kursoj vi refreŝigos vian spiriton, vian kapablon paroli en Esperanto. Kaj restado en amika, preskaŭ familia rondo de esperantistoj refreŝigos ankaŭ vian animon, la animon, kiu serĉas komprenon.

Venu al Doksy por travivi neforgeseblajn tagojn. Kaj tiu, kiu el vi havas pli multe da tempo, venu ankaŭ al Kost, kie, tuj post fino de la kursoj en Doksy, komencas seminario kaj turismaj ekskursoj. Vi poste revenos freŝaj korpe kaj spirite, plenaj de entuziasmo al ĉiutaga porpana laboro kaj al tiu poresperanta.

Venu, ni ĝoje vi atendas! Ant. Slanina

- -

MEMORO PRI MORTA POETO

Ĉe ponto, kie stel' pereas en profundo,
ĉe ponto, kie ekhaltiĝis la sekundo,
kantinto morta kun krevita mandolin'
"-ĉu aŭdis vi?-" demandis tre silente min.

Kaj io sonis inter la ĉiel' kaj tero,
per zumzumado mola tintis atmosfero -,
kantinto morta terenfalas pro la kant',
dormanta en branĉaro kiel konsolant'.

Kaj super la kantinto liaj vivaj kordoj
ekĝemis kiel kruc' sonanta en agordoj.
Kaŝita en malluma horo de aŭtun'
"-ĉu aŭdas vi?-" la ombron mi demandas nun.

- - Eva Suchardová

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO - DOKSY - LETNÍ KOLEJ ESPERANTA
25.7.-7.8.1954

Místní osvětová beseda v Doksech uspořádá pod záštitou okresního výboru obránců míru v Doksech za spolupráce stálého přípravného výboru Letní koleje esperanta ve dnech 25.7.-7.8. tyto kursy: A. základní (pro začátečníky, zábavnou a názornou methodou), B. pokračovací, C. konversační, D. seminář pro vyspělé s přednáškami z esperantologie, esperantismu, o esper. hnutí a literatuře, E. řečnický a o umění jednati s lidmi (pro účastníky kursů C a D, spojených na vyhražené hodiny). Frekventanti obdrží kolejní osvědčení o návštěvě kursů ještě před odjezdem.

(Pokračování na další straně)

Dopoledne kursy, odpoledne rekreace na plážích u Máchova jezera (České moře) a vycházky do rozsáhlých lesů, večer zábava (společenské a zábavné podniky). V neděli 1.8. celodenní autokarový výlet do Liberce (nikoliv do Českého ráje), kde návštěva zoologické zahrady a lanovkou na Ještěd (1010 m). V prvním týdnu odpol. výlet na Bezděz se scénou z básně Svat. Čecha "Vězeň na Bezdězi" a s tancem v podhradí.

Příjezd do Doks a začátek ubytování v neděli 25.7., odjezd v sobotu 7.8. 50% sleva na dráze. - Přihlášky do 5. července 1954 jsou závazné, kolejné nutno uhraditi současně. Přihlášeným budou 18.7. zaslány průkazky, slevenky a podrobné informace. Neurgujte je! - Zahajovací večer v neděli 25.7. ve 21 hodin v Osvětovém domě. - Ubytování obstará kolej (hotel, soukromí). Stravovánní kolej neobstarává. Účastníci si je sami zajistí v místních rest. podnicích dle své volby. - Kolejné, jež nutno uhraditi současně s přihláškou, činí včetně vstupného na spol. a zábavné podniky, permanentky k jezeru, za odvoz zavazadel z nádraží, osvědčení, rež. příspěvek a byt v soukromí 282 Kčs, v hotelu 321 Kčs. Zájezdy Bezděz, Ještěd vč. vstupného a lanovky (Liberec ZOO) 60 Kčs. Všechny platby třeba zaslati na účet Letní koleje esperanta č. 2240 u Státní spořitelny v Doksech (účet č. 237002 u SBČs Doksy - směrovací znak 0603-1). Vkusný barevný prospekt LKED vyšel. V něm oficiální přihláška, kterou každý (třeba již provisorně přihlášený) musí vyplniti a zaslati Letní koleji esp. v Doksech (V.Špůr, telefon č. 393). Vyžádejte se prospekt! Počet účastníků omezen! Podejte proto přihláčku ve svém zájmu co nejdříve!

TÝDENNÍ KULTURNĚ-REKREAČNÍ SEMINÁŘ ESPERANTISTŮ NA KOSTI V ČESKÉM RÁJI.
8.8.-15.8.1954

Esperantský přednáškový seminář - výlety napříč Českým rájem - koupání - večery zábavného programu a tance. Dodatkem ke zprávě v květnovém č. V.V. se sděluje: Účastníci mají 50% slevu na dráze. Kolejné s hotelovým ubytováním (mimo stravné) včetně večerních zábav a podniků činí 136 Kčs. Počet účastníků omezen na 50! Vyžádejte si tištěný prospekt, v němž je oficiální přihláška, kterou nutno vyplnit a s urychlením zaslat na adresu: Karel Šolc, Mladá Boleslav, Janáčkova 566/III.

- -

VI. BELARTA KONKURSO "FLORAJ LUDOJ" (Květinové hry) EN DOKSY 1954.

Dodatkem ke zprávě v květnovém V.V. se sděluje, že práce je nutno podepsati značkou, jež souhlasí se značkou na přiložené obálce, obsahující pisatelovu adresu. Příspěvky došlé po 15.7., popř. obsahující gramatické chyby, jsou ze soutěže vyloučeny. Výsledek soutěže bude veřejně oznámen na akademii LKED.

ESPERANTSKÉ DIVADELNÍ AKTOVKY V LETOŠNÍCH "DOKSECH"

Letos budou sehrány za kolejních kursů dvě esperantské aktovky, napsané sam. Ant.Seemannem a E.Suchardovou:

1. "Mi esperas", drama o 1 dějství o Dru Zamenhofovi. Děj ve Varšavě r. 1888.
2. "Korespondu", jednoaktová komedie. Osoby: Pierre, Henri, Lisa, jeho žena, Inéz, španělská esp. korespondentka. Odehrává se v Paříži.

NOVAĴOJ DE SKED

Al Somera Kolegio de Esperanto en Doksy jam aliĝis 40 personoj.

-

Krom aliaj aranĝoj oni preparas "Venecian nokton" sur la lago, kaj "Someran karnavalon". Partoprenantoj, ne forgesu kunporti maskojn!

-

Oratora kurso estos multe pli riĉa. Ne preterpasu la okazon fariĝi oratoro. Nia devizo estas: Ni bezonas ne nur skribantajn kaj legantajn (elegantajn) esperantistojn, sed ankaŭ parolantajn! Kiu volas propagandi Esperanton, devas ĝin flue regi! Ne estu eternaj komencantoj! Preparu viajn temojn al diskuto!

-

"Verda Voĉo" dum SKED aperos ĉiutage. Ni serĉas spertajn kunlaborantojn.

-

Venonta numero de "Verda Voĉo" aperos jam dum SKED.

- - -

Praha, junio 1954